Ĉi tiun deklaron kreis Ĉeĥlingve Petr Jansa kun afabla kunlaboro de siaj gekolegoj Irena Holcová, Kateřina Slušná kaj Jan Diblík sub la titolo „Prohlášení o poskytnutí licence Creative Commons“. La tekston povas ĉiu ajn uzi laŭ la kondiĉoj de la publika permesilo *Krea Komunaĵo Atribuite 3.0 Neadaptita*, atingebla je la retadreso *http://creativecommons.org/licenses/by/3.0/legalcode*.

# DEKLARO PRI LIVERO DE PERMESILO KREA KOMUNAĴO[1]

Mi, sube subskribita **Jakob Udo TSUJIMOTO**,
naskita la 29-an de Februaro 1970 en Bjarkøy (distrikto Hålogaland, provinco Troms, Norvegujo),
loĝanta je la adreso Rue Turbigo n-ro 73 en Parizo (Francujo),

ĉi-maniere deklaras, ke

a) mi estas aŭtoro kaj posedanto de la aŭtorrajtoj[2] por la artikolo **„Pri insuloj en maro“**, *eldonita la 24-an de Aprilo 2009 en la ĵurnalo „Nia naturo“ / kiu ĝis nun ne estas publikigita*[3] (plue nur „verko“);

b) kun efiko ekde hodiaŭ mi liveras por la verko la permesilon **Krea Komunaĵo Atribuite 3.0 Singapuro**[4], atingeblan je la interreta adreso *http://creativecommons.org/licenses/by/3.0/sg/legalcode* (plue nur „permesilo“) – alivorte, mi disponebligas la verkon laŭ la kondiĉoj de ĉi tiu permesilo;

c) sur la verko ne estas rajtoj de triaj personoj, malebligantaj liveri la permesilon, kaj mi havas rajton liveri la permesilon sen iu ajn limigo – t. e. precipe mi deklaras, *ke nenia ekskluziva permesilo estas liverita por la verko / por la verko estis liverita ekskluziva permesilo, kies validodaŭro jam finiĝis*[5] kaj

d) mi plene konscias pri la enhavo de la liverata permesilo, t. e. precipe, ke:

- la permesilon mi liveras al nelimigita aro da homoj,
- la permesilo rajtigas la akiranton plue kopii kaj kunhavigi la verkon,
- la permesilo rajtigas la akiranton aliigi la verkon,(BY, BY-SA, BY-NC, BY-NC-SA)
- la permesilo rajtigas la akiranton plue kunhavigi la aliigitan verkon,(BY, BY-SA, BY-NC, BY-NC-SA)
- la akiranto devas nepre atribui la verkon laŭ mia postulo,
- mia memdevigo liveradi la permesilon daŭros dum la tuta tempo de protekto de la verko, kio i. a. malebligas liveron de ekskluziva permesilo, kiu pluan liveradon de la permesilo Krea Komunaĵo malpermesus.[6]

En Prago, la 29-an de Aprilo 2009

____________________________

**Jakob Udo TSUJIMOTO**

---

1 Estas bone ricevi la deklaron de la aŭtoro, se vi volas laŭ permesilo Krea Komunaĵo (CC) kunhavigi (ekzemple pere de via retpaĝaro) verkon, kiu ankoraŭ ne estas disponebla laŭ la permesilo CC kaj kies aŭtorrajtojn vi ne posedas. La permesilon CC eblas liveri ankaŭ voĉe, tia deklaro tamen estas nur por vi pruvilo, ke la aŭtoro efektive liveras la permesilon kaj konsentas kun plua disvastigado de la verko laŭ la kondiĉoj de la konkreta permesilo CC pere de vi (aŭ iu ajn alia). La funkcion de deklaro povas iagrade plenumi ankaŭ alimaniera registraĵo de la aŭtora volo – ekz. retmesaĝo, enhavanta postulon pri publikigo de la verko laŭ konkreta permesilo, aŭ ligilo al la permesilo, enkorpigita rekte en la verko.

2 Ĉe kunaŭtoroj necesas akiri konsenton de ĉiuj. Se la deklaron subskribas alia persono ol la aŭtoro, necesas mencii lian postenon, kial li estas rajtigita tion fari, ekz.:
- dunginto ĉe verkoj de dungitoj (Ni, la sube subskribita kompanio KZ ĉi-maniere deklaras, ke ni estas efektiviganto de la posedaj aŭtorrajtoj por la verko A, kreita de nia dungito B, ...),
- heredinto (... mi kiel heredinto estas portanto de la posedaj aŭtorrajtoj por la verko A, kies aŭtoro estas mia malido/sinjoro/sinjorino B, ...).

3 Pluaj verkaj ekzemploj: *... kolekto de 128 papiliaj fotaĵoj... / ... 15 sonregistraĵoj de aŭtoraj blusaj kantoj...*

4 Entute ekzistas ses tipoj de la permesiloj Krea Komunaĵo kaj en neadaptita internacia formo kaj en adaptoj por ideala kongruo kun diversaj jurisdikcioj (vidu *http://creativecommons.org/international*), kiuj tamen estas ankaŭ internacie validaj:

| | | |
|---|---|---|
| • *Atribuite* (BY) | *http://creativecommons.org/licenses/by/3.0/deed.eo* | *.../by/2.5/ch/deed.eo* |
| • *Atribuite-Samkondiĉe* (BY-SA) | *http://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/deed.eo* | *.../by-sa/2.5/ch/deed.eo* |
| • *Atribuite-Neŝanĝite* (BY-ND) | *http://creativecommons.org/licenses/by-nd/3.0/deed.eo* | *.../by-nd/2.5/ch/deed.eo* |
| • *Atribuite-Nekomerce* (BY-NC) | *http://creativecommons.org/licenses/by-nc/3.0/deed.eo* | *.../by-nc/2.5/ch/deed.eo* |
| • *Atribuite-Nekomerce-Samkondiĉe* (BY-NC-SA) | *http://creativecommons.org/licenses/by-nc-sa/3.0/deed.eo* | *.../by-nc-sa/2.5/ch/deed.eo* |
| • *Atribuite-Nekomerce-Neŝanĝite* (BY-NC-ND) | *http://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/3.0/deed.eo* | *.../by-nc-nd/2.5/ch/deed.eo* |

5 Liveron de la permesilo povas malebligi ankaŭ antaŭe liverita neekskluziva permesilo. Tiu povas difini certajn limigojn, kiuj ja estas akordaj kun la permesilo CC, sed necesas ilin en la deklaro mencii – ekz. devon ĉiam dum plua disvastigado de artikolo referenci al periodaĵo, kie ĝi estis publikigita origine.

6 La listigon necesas modifi, por ke ĝi kongruu kun permesaj elementoj de konkreta elektita permesilo – la unuaj du kaj lastaj du linioj restos ĉiam, la mezajn du necesas anstataŭigi aŭ kompletigi per la jenaj:
- la permesilo rajtigas la akiranton uzi la verkon nur por nekomercaj celoj,(BY-NC, BY-NC-SA, BY-NC-ND)
- la permesilo ne rajtigas la akiranton aliigi la verkon nek krei proprajn verkojn bazitajn sur ĝi,(BY-ND, BY-NC-ND)
- la akiranto rajtas kunhavigi la aliigitan verkon nur laŭ la sama, simila aŭ kongrua permesilo.(BY-SA, BY-NC-SA)